# N I A V O Ĉ O

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
. lunde vespere (91) 5 30 87 98 * fax (91) 5 71 08 52
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz JUNIO 1994


**En majo forpasis s-ro José Prat, eks-senatoro kaj prezidanto de Ateneo de Madrid. Ekde sia juneco li apogis esperanton kaj kutime salutis partoprenantojn en esperanta konversacia rondo kiu okazas _e Ateneo gvidata de Lucrecia San Antonio.**

***KOTIZO POR 1994 KUN DONACO***

*La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj du jaroj. Bv.* ***sendi ĉekon po 2.000 ptjn****, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭdankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL.* ***Se vi pagas rekte ĉe la Liceo (lunde vespere) vi ricevos kiel donacon, la libron "Historia del Esperanto en Madrid"****, dulingva versio verkita de Lupe Sanz Bueno. Se via kotizo estas pagata aperas "P" antaŭ via membro-numero en la etikedo, kontraŭe vi ŝuldas 1994.*

**LA PAPO SALUTIS EN ESPERANTO**

"Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta". La evento okazis unuafoje en la historio dum la ĉijara Paska Dimanĉo, la 3-an de aprilo, en la kadro de la tradicia beno "urbi et orbi" kaj sekvis oficialan peton fare de la Radikala Partio (kiu apogas esperanton) kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. MEL, apogas proponon de Cesar de Mosteyrín kaj sugestas sendi dank-leterojn privatajn aŭ de grupoj al Vatikano.

**KAMAĈO PREMIITA**

En la 33-aj Internaciaj Floraj Ludoj de Kataluna Esperanto-asocio Georgo Kamaĉo gajnis la premiojn "Englanterio" kaj "Violo" respektive por siaj poemoj "Patrino" kaj "Oksfordo".GRATULON!

**UNUAFOJE EN LA MONDO**

La urbodomo de Barcelono aprobis nomi metro-stacion en la linio n-ro 2 kun la nomo de **Doctor Zamenhof**, honore al kreinto de la internacia lingvo. Dankon al ĉiuj kiuj apogis proponon de esperantistoj el Katalunio.

**ANGOLANO EN MADRIDO**

Kiel studento de la hispana lingvo estas en Madrido samideano Mbuaka Gonçalves el Angolo. Li kutime partoprenas en konversacia rondo ĉe MEL kaj sendis jenan noton al "Nia voĉo": *Lasttempe, Afriko estas terure minacita de kelkaj militoj kaj esperantaj movadoj ne funkcias tiel bone kiel antaŭe. La mankoj de lernmaterialoj kaj aliaj esperantaĵoj estas la plej ĉefa kaŭzo en Afriko. Dank'al Afrika Kongreso okazonta en GHANA (GANAO), ni atendas vian subtenaĵon por la disvastigo de esperanto en Afriko.*

**ARĜENTA INSIGNO KUN VERDA STELO**

Farita de juvelisto simpatiano de Esperanto, MEL oferas po 300 ptj esperanta insigno farita el arĝento kun emajloj blanka kaj verda. Sendoj po dek (10) antaúpago de 2.700 ptj pere de poŝtmandato al Madrida Esperanto-Liceo (inkludas sendokoston).

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º
Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. _is la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson: (91) 446 80 79

Venontaj programoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4º:

20-an junio.- "Bankoj kaj bankistoj". Pedro Garrote

**NIA KORUSO**

La koruso "Verda stelo" kiu gvidas Laura Carballo da_rigas sian sukcesan laboron. La 2-an de majo partoprenis en korusa recitalo kune kun alia 18 madridaj korusoj, Ĉe Palacio de los Deportes de Madrido. Ankaŭ ĝi havas grandan programon por kanti en nupto-ceremonioj.

**"VERDA STELO" JUBILEAS**

Dum 1994 okazas la 10-a datreveno de la madrida esperanto-koruso.
Jubilea koncerto rememoros la eventon la **22-an de junio, je la 20,00 horo, en preĝejo San Jerónimo el Real**. La unua parto de la koncerto konsistos el diversaj kantoj en esperanto, dum la dua parto, kune kun la orkestro, ĝi ludos "Gloro (Gloria)" de Vivaldi.

NI ATENDAS VIN!

**KONGRESOJ**

16-21a de julio en Málaga, 53a Hispana Kongreso de Esperanto
9-a ĝis 14-a de aŭgusto "Eŭska aventuro" ĉefe por gejunuloj. Eŭska Esperanto-Asocio.
8-11a de septembro. 1-a Seminario "Esperanto: Kulturo kaj socio". Temo: Rasismo kaj ksenofobio en la nuna Eŭropo. Paterna (Valencio) (Vidu aliĝilon por kotizo kaj loĝado)

**"Nia voĉo" DISTRIBUADO**

Pro la altigo de la poŝtmark-prezo:14 ptj por Madrido kaj 18 por
provincoj ni nur sendos al jenaj: membroj de MEL kiuj pagis 1993 kotizon, hispanaj esperantaj grupoj kiuj sendas al MEL siajn revuojn. Aliaj grupoj povas ricevi ĝin kontraŭ 72 poŝtmarkoj de 14 ptj.(1.008 ptj) a_ 56 de 18 ptj.

**NUR POR KELKAJ**

Liceo havas malgrandan stokon de la libro "El esperanto en 20 leciones" de V. Inglada. Eldonita en **1931**. Ni sendos tiun ĉi libron plus "Seminario pri sporto-1982 (kun sporta terminaro en esperanto)" nur po 1.000 pesetojn (inkludas sendokoston). Antaŭpago necese pere de poŝtmandato al Liceo.

**HEF ANGULO aŭ MEL sugestas**

Dum majo MEL sugestis al HEF, pere de aŭtomata respondilo, studi eblecon por partopreni el la 1-a Foiro de Kulturaj Asocioj kiu okazis en Madrido dum majo. MEL ne havas junan membrojn por partopreni.

**KASEDA REVUO**

Denove ni anoncas sonrevuon eldonitan antaŭ 12 jaroj. Vi povas ricevi se vi sendas kasedon al Adamo Goralski. Gral Fanjul 17-1ºD, ES-38006 Santa Cruz de Tenerife.